# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo julio-aŭgusto 2024**


## ALIĜU SENPROKRASTE AL LA HISPANA KONGRESO

La organizantoj de la venonta Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 5-a ĝis la 8-a de septembro en la urbo Cheste (apud Valencio), anoncis ke la dua aliĝperiodo prokrastiĝis kelkajn tagojn, ĝis la 10-a de julio. Tiel vi povos profiti pli malaltan kotizon. Krome, tiel unueciĝas la periodo kun la ebleco rezervi loĝadon dum la kongreso en ties ĉefsidejo, la Eduka Komplekso (tradicie nomata “Labora Universitato”) de la urbo. Pro organizaj kialoj de tiu institucio, ili petis ke oni konfirmu tiujn rezervojn ĝis tiu dato, kaj oni poste ne povos certigi la loĝadon, kio estas alte rekomendinde pro la konveno loĝi en la kongresejo mem, kaj krome pro la tre altiraj prezoj. Ankaŭ eblos manĝi en tiu kongresejo.

Vidu la detalojn kaj ankaŭ la aliĝilon en la retadreso: https://kongreso.esperanto.es/.

Ankaŭ ekzistas proksima hotelo, Hotelo Torrijos, kiu proponas specialan prezon por kongresanoj, sed nur ĝis la 9a de aŭgusto. Kontaktu kun ĝi rekte (kontaktadresoj en la antaŭa ligilo, sekcio Loĝado).

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN



Vizitas nun Madridon Paŭlo Sergio Viana, tre konata brazila esperantisto kaj verkisto (vidu foton). Li restos ĝis la 10-a de julio. Ankaŭ troviĝas en Madrido usona esperantisto, Marlon, kiu jam vizitis nian urbon plurfoje.

Anonciĝis ankaŭ aliaj vizitantoj dum la somero, ekz. Iván el Kolombio, Tamara el Koreio kaj Vilhelmo el Kubo, sed ni ankoraŭ ne fiksis la renkontojn. Do, bonvolu esti atentaj al la kutimaj retaj forumoj kaj sociaj retoj, kaj nun ankaŭ al la grupo de ŭacapo (whatsapp), pri kiu ni informis en pasinta numero (memoru ke vi povas aliĝi al ĝi per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g).

Aŭ, se vi konas aliajn vizitontojn, ne hezitu informi la adreson de Liceo.

## PLIAJ FESTOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Memoru ke la 26-a de Julio estos la datreveno de la apero en Varsovio de la Unua Libro, la prezentado de la lingvo Esperanto, kaj ke de antaŭ jaroj oni ofte festas ĝin kiel la Tago de Esperanto, apud la plej konata Zamenhof-Tago. Ĉijare denove Universala Esperanto-Asocio instigis festi ĝin, kaj ni provos organizi ion en Madrido malgraŭ la datoj.




Krome, dum tiuj ĉi venontaj du monatoj vi povas profiti la okazon por esperantumi internacie, profitante la multajn kongresojn kaj renkontiĝojn en la tuta mondo. Ni memorigas la plej amasajn antaŭvideblajn:

La Universala Kongreso okazos unuafoje en Afriko, konkrete en Aruŝo (Tanzanio), de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. Eblas trovi pliajn informojn en https://uk.esperanto.net/2024/.

La 80-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Litovio, de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto, organizata de TEJO.

La kongreso de ILEI (instruistoj) okazos en Ameriko, konkrete en Maceió (Brazilo), inter la 20a kaj la 27a de julio.

**nia voĉo** **julio-aŭgusto 2024**

La kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos pli proksime, en Porto (Portugalio), inter la 5a kaj 11a de aŭgusto.

Kaj ankaŭ internacia estos la hispana kongreso, kiu disvolviĝos en Cheste en septembro, al kiu jam aliĝis esperantistoj el dudeko da landoj de la mondo.

Vi povas ekscii pri ili kaj pri multaj aliaj eventoj, kursoj kaj renkontoj pere de la retejo EventaServo.org.

## DISPONEBLAS NOVAJ LIBROJ EN LA SIDEJO




En la sidejo de la Liceo eblas aĉeti du novajn librojn antaŭnelonge eldonitajn, pere de SAT-en-Hispanio

La unua estis eldonita de SATeH mem: la titolo estas "Volontuloj kun okulvitroj", kaj ĝi temas pri partopreno de eksterhispaniaj volontuloj dum la Hispana Enlanda Milito. La libro konsistas ĉefe el du verkoj, membiografiaj, kiuj rakontas la spertojn de du tiaj vizitantoj: "La hispana tragedio" de la nederlanda verkisto Jef Last kaj "Hispana somero" de la norvega Nordahl Grieg. Krome, ĝi inkludas klarigajn tekstojn pri la milito, la partopreno de ekster-landaj volontuloj, la rolo de intelektuloj kaj la uzo de Esperanto dum ĝi, verkitaj de Toño del Barrio. Pliaj detaloj aperas en: https://www.nodo50.org/esperanto/nova-libro-eldonita-de-sateh-volontuloj-kun-okulvitroj/.

La alia libro estas "La palabra y el viento", de Miguel Fernández, versio en la hispana de noveloj el lia originala verko en Esperanto "La vorto kaj la vento", pri kiu ni informis en pasintaj numeroj. Nun vi povas aĉeti ĝin ankaŭ en nia sidejo. Vi povas mesaĝi al libro@esperanto.es por koni detalojn.

## PLIAJ INFORMOJ KAJ RENKONTOJ

Ni daŭrigas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Tamen, pro la ferioj ni rekomendas ke vi telefonu antaŭ ol veni, ĉefe en aŭgusto.

En julio kaj aŭgusto ne estas apriore antaŭvidita unuasabata renkontiĝo, kaj ni denove intervidiĝos en septembro (sed verŝajne ne en la unua sabato, dum kiu okazas la Hispana Kongreso en Cheste)

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

**FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ!**

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com